



ESPERO KATOLIKA

SOCIETO POR INTERNACIA LINGVO.

Aktivas en Germanio, la fine de 1952 en la juĝejan registron enigita „Gesellschaft für Internationale Sprache e.V.“. La celo de tiu societo estas trakti la problemon de internacia lingvo laŭ scienca — t.e. lingvosciencia kaj lingvopolitika — vidpunkto moderna, progresigi la diskutadon pri interlingvistiko, aperigi verkaĵojn de interlingvosciencia karaktero kaj tiel partopreni la klopodojn je la enkonduko de neŭtrala lingvo por ĉiuj homoj apud la gepatra. Do la societo okupiĝas nur pri interlingvistika esplorado kaj tiel varbas objektive por la kompreno de la problemo de internacia lingvo, sed la societo ne propagandas, do ankaŭ ne konkurencas aliajn organizojn.

La Societo por Internacia Lingvo nuntempe ĉiun monaton eldonas (provizore malgrandan) cirkuleron, aperigis ĝis nun informan broŝuron (germanlingvan kun Esperanta resumo) „Pri la problemo de Internacia Lingvo” kaj intencas, supozeble fine de ĉi-jaro, publiki libron pri nova sistemo de interlingvistiko.

Aktivaj gemembroj de la Societo por Internacia Lingvo estas science interesitaj ĝeesperantistoj en Germanio. Estraranoj estas d-ro Happe, Bad Oeynhausen, d-rino Leubner, München, d-ro Ziegler, München, kaj prezidanto d-ro Bormann. Honoraj korespondaj membroj estas la konataj esperantistoj

prof. d-ro Collinder, Uppsala, Svedio,
 prof. d-ro Collinson, Liverpool, Britio,
 prof. d-ro Görlich, Wien, Aŭstrio,
 prof. d-ro Lapenna, London, Britio,
 prof. d-ro Musella, Roma, Italio,
 prof. d-ro Nishi, Maebaŝi, Japanio,
 prof. d-ro Sirk, Wien, Aŭstrio.

Ni petas la atenton de niaj legantoj pri la cirkulero de la societo, kiun ni publikigas en ĉi tiu numero de *Espero Katolika*.

Societo por Internacia Lingvo (Dr. Bormann).

★

Internacia Katalika Infarmejo.

Kiam la Izraelidoj militis kontraŭ la soldatoj de Amalek, Moseo preĝadis kun etenditaj brakoj por la venko de sia popolo. Kiam pro lacego li devis mallevi ilin, la malamiko venkis, sed dum li ilin etendis, la Izraelidoj estis la venkantoj. Tial Aaron kaj Hur subtenis la brakojn de Moseo, kiu tiel restis preĝanta dum la tuta tempo ke Izraelo devis batali kontraŭ la Amalekidoj. Tiamaniere Josue povis glavmortigi la hordeojn.

Tiel potenca estas la preĝo! Ne forgesu:

SEN VIA MONO IKI NE POVAS LABORI,

SEN VIA PREĜO TIU LABORO RESTOS SENFRUKTA!

E. H.

APLIKO DE ESPERANTO SUR GRAVAJ TERENOJ.

Multaj esperantistoj miras pri tio ke en internaciaj kunvenoj de politikistoj tiel ofte tiel akraj voĉoj kontraŭ Esperanto aŭdiĝas. Fakte tio ne estas tro mirinda. Ĉar tie la demando estas kutime traktata ne laŭ objektiva vidpunkto, sed laŭ pure nacipolitika, kaj ĉiu diskutanto kredas devi pledi por la evidentaj interesoj de la ŝtato reprezentata, t.e. ne rezigni eĉ la plej etan eron el la nacia suvereneco — kion ja signifus la konsento pri la neuzo de la nacia lingvo kaj la deviga uzo de certa alia interkonsentita lingvo en internaciaj rilatoj. Tia starpunkto estas tipa por la nurmomenta politiko. Ni konas ekzemplojn el la traktadoj de la komisionoj de UNO kaj de la Eŭropa Konsilantaro. Tiu miopeco ne estas mirinda, ĝi estas bedaŭrinda.

Sed mirinde estas ke ankaŭ fare de sciencistoj ofte aŭdiĝas voĉoj kontraŭ Esperanto: lastfoje ekz. de dana profesoro en Montevideo, kiun vi certe rememoros. Karakteriza estas por tiuj scienculoj la cirkonstanco, ke ili en tute nescienceca maniero juĝas pri fenomeno kiel Esperanto sen ia aŭ sen sufiĉa scio, nur laŭ onidiroj pri ĝi. Kontraŭulo inter la germanaj lingvistoj estas ankaŭ prof. Weisgerber el Bonn („Das Gesetz der Sprache”); en ties lingvosciencan sistemon internacia lingvo ne estas enmetebla, do laŭ li tia ne povas ekzisti.

Tamen la kontraŭula fronto de la lingvosciencistoj estas iom post iom malplifortiĝanta: La lingvosciencistoj, laŭ klaraj vortoj de kelkaj eminentaj, hodiaŭ almenaŭ agnoskas ke lingvo tia kia Esperanto estas ebla kaj aplikebla, eĉ se ili ne ŝatas ĝin kaj ne deziras ties enkondukon. En Germanio tio estas la opinio ekz. de prof. Porzig („Das Wunder der Sprache”) kaj de prof. Gerhardt („Zur Problematik der künstlichen Weltsprachen” en „Studium Generale” 4/1951). El la rondo de la jam mortintaj lingvistoj ni menciuj eminentulojn kiel la francan akademianon Meillet kaj la germanan profesoron Voss, kiu, iam estinte malamiko de la projekto de internacia lingvo, poste vere varme kaj impreso favoris Esperanton. Inter la lingvosciencistoj, kiuj aktive laboras en la vicoj de la esperantistoj, ni konas niajn kunsocietanojn, la lingvistojn de internacia reputacio: prof. Collinder. Uppsala, kaj prof. Collinson, Liverpool. Do ne estas kontesteble, ke ne nur la ĝenerala problemo de interlingvo, sed ankaŭ la speciala fakto de la ekzisto de Esperanto kaj la problemo ĉirkaŭ ĝi estas ĉiurilate inda objekto de scienca esplorado komparebla al ĉiu fako, pri kiu jam nun prelegiĝas en la universitatoj de la mondo.

Je tio, ke duboj pri la scienca valoro kaj seriozeco de Esperanto estiĝis, pleje kulpas unufanke la esperantistoj mem kaj aliflanke la mondlingvanoj ĝenerale.

Multaj esperantistoj havas hodiaŭ la samajn ideojn, kiujn oni havis komence de la jarcento, kaj propagandas uzante la samajn argumentojn. Ili ne atentis, ke la epoko de romantika entuziasmo kaj entuziasmigeblo estas pasinta kaj ke nuntempe nur sobra politiko kun kunformaj metodo kaj argumentado progresigas. Malutilaj estis ĉiam la konfliktoj interne de la Esperanto-movado, indiferente ĉu rilate organizajn aŭ prilingvajn demandojn. Malutilaj estas precipe ĉiuj neorganikaj reformplanoj. Iam, antaŭ 50 jaroj, per la displito de la Ido-istoj la Esperanto-movado estis malplifortigita, sed pro la nekapablo de la iniciatintoj kaj la netaŭgeco de ties reformoj la danĝero foriĝis: Esperanto pruviĝis pli bona. Ankaŭ hodiaŭ, laŭ Esperantopolitika starpunkto, diskuto ekz. pri la utileco de la supersignoj, de la akuzativo, de la plurala -j estas tute neblaj. Krome eventualaj reformemadoj en tiu rilato estus el lingva vidpunkto pro tio vanaj, ĉar la kontraŭargumentoj estas same aŭ eĉ pli fortaj. Do la movado prave tute ne atentis tiajn provojn. Cetere ĉiu devas

facile kompreni, ke ne eblas pledi por la enkonduko de Esperanto kaj samtempe diri ke „plibonigoj” povas esti konsiderataj; oni tiel ja detruus la bazon, sur kiu oni operacias. La oficiala traktado de la temo Esperanto sur la Unesko-konferenco ja evidentigis ankaŭ, ke la demando nur estas aŭ akcepti Esperanton aŭ rifuzi la tutan ideon.

Malutila por la progreso de niaj klopodoj ĝenerale estis ankaŭ la fakto, ke multnombraj aŭtoroj inventis kaj publikis specialan projekton de interlingvo. Tamen kiel la plejmulto de la partoprenintoj de la oficialaj traktadoj pri la problemo de internacia lingvo sciis pri Esperanto nenion krom la nomo, tiel ili plejparte ankaŭ scias (dank' al Dio) nenion pri la granda nombro da projektoj, krom eble la por ili same nebulaj nomoj tiaj kiaj Volapük, Ido, Interlingve. Ĉiuj projektoj, ĉu konstruitaj kun ŝajne pli granda scienca akurateco, ĉu naive starigitaj, estas laboraĵoj neglektindaj, ĉar neniu povas esti pli perfekta ol la teorie kaj praktike taŭga pruviginta Esperanto. Male, estas pruveble ke Esperanto kiel lingvo de pli skemeca tipo estas por la ĝenerala lingva interkompreniĝo pli taŭga ol lingvo de pli natura tipo. Krome oni ne povas aserti ke Esperanto laŭ la ekstera aspekto estas ne sufiĉe moderna. Supersignoj, akuzativo kaj aliaj karakterizaĵoj troviĝas ankaŭ en naciaj lingvoj. En multaj rilatoj oni povus diri ke lingvoj vivantaj estas vere ne modernaj laŭ principoj, kiujn oni hodiaŭ ofte aplikas. Sed estus absurda diraĵo ke tia aŭ alia nacia lingvo estas nemoderna strukturaĵo. Do ankaŭ lingvo kiel Esperanto neniam povas esti ne moderna. Ni jam ekvidas el tiu argumentado ke multo, kio estas disputata pri nia problemo, ne estas serioza. Nu, la plej mirinda fakto estas ke homoj povas diri ke ili estas mondlingvanoj — sed nur, se la projekto, kiun ili mem konstruis, estos akceptata. Vere ne diskutebla diraĵo, nek el lingva, nek el homara vidpunktoj. Plua neobjektiva aserto estas ke interlingvo estas kontraŭenda pro tio ke ĝi ne povas esti konforma al Dia volo, ĉar Dio kreis multajn naciajn lingvojn, nur ne interlingvon. La eklezio mem refutas tiun strangan argumenton, ĉar papoj kaj multaj pastroj favoras per sia aŭtoritato aŭ per aktiva agado Esperanton. Do multo okazas kaj multo estas dirata, kio ne estas trafa, ne inda, ne serioza, t.e. malutila al la ideo de vere internacia lingvo. Kaj se la energioj ĉiuj, kiuj estis kaj estas uzataj por atingi individuecajn celojn, estus kunigitaj kaj kunigataj, la nuna stato de nia afero certe estus pli progresinta.

Ni nepre devas forŝovi koncerne nian problemon ĉiun diskutadon kiu ne progresigas. Ni devas ĉiam serĉi penetri en la kernon de la problemo. Esperanto ekzistas kiel idiomato aplikata, do vivanta. Ĝi estas lingvo laŭ science ne atakeblaj principoj konstruita kaj laŭempirie bonege funkcia. Certe ankaŭ aliaj ebloj ekzistas, sed ili ne estas kaj ne povas esti aktualaj — malgraŭ la klopodoj de certaj interese-muloj.

Ni koncentru niajn fortojn — krom la organiza laboro — en la science valora okupiĝo pri la Internacia Lingvo kaj la metodoj de ties realigo, do ni aktivu precipe sur lingvosciencia kaj lingvopolitika terenoj.

Societo por Internacia Lingvo.
D-ro Bormann.

LIBERTEMPO. La **Administrejo** de la sekretario/kasisto en **Vleuten** estos fermita de 4 Julio - 9 Aŭgusto 1955.
Kiel kutime **Espero Katolika** ne aperos en la monato Aŭgusto.

LA OFERO

La junuloj disiĝis al siaj domoj, kaj Ivo venas eksteren por iomete promeni. Estas belega, stelplena nokto. Silentego estas kaj trankvilo, nur venteto malpeza muĝas tra la branĉaro de la sveltaj poploj.

Ivo iradas kun klinita kapo kaj kun okuloj terendirektitaj. Li ne povas rigardi la stelojn. Ĉi tio jam plurfoje okazis al li, kaj ĉiufoje kiam en sia animo li sentas sin maltrankvila aŭ kiam la konscienco ion riproĉas al li.

Kio estas nunvespere, kio okazis al li? Li estas afliktita, maltrankvila, batalas kun si mem. Li memoras, kiel iam li estis gaja, flugopova kaj plena de entuziasmo por siaj grandaj idealoj kaj sia belega profesio. Li deziras sacerdotiĝi. Dum la ferioj ofte venadas al li knaboj kaj junuloj, kaj li rakontas al ili. Ĉi tio estas por ilia amuzo, sed li malrapide kaj nerimarkeble klopodas levi pli alten, nobligi kaj direkti al bono ĉi tiujn junajn korojn. Li estis ilia gvidanto kaj apostolo.

Sed nun? Nun la horizonto de lia animo noktiĝis, la suno de liaj idealoj mallumiĝis. Laboro por junuloj lin preskaŭ ne plu interesas. El la fundo de sia animo li ankoraŭ rakontas al ili, ĉar ne estus oportune se li nun pro malespero ĉesus sian rakontadon. Sed ĝi jam ne estas tiel entuziasma kiel antaŭe. Ankaŭ pri aliaj siaj laboroj kaj devoj li nun pli malmulte okupiĝas. Lia preĝado ankaŭ ne plu estas tiel elkora kiel kutime. Kaj ĉion tion kaŭzis du nigraj, profundaj knabinaj okuloj, en kiuj dronis la rigardo de Ivo. Jes, Ivo devas konfesi al si mem: li estas enamiĝinta. Certe, ĉi tio neniel estas stranga por junulo en lia aĝo, sed tute natura afero. Tamen Ivo estas konvinkita, ke la voĉo de Dio en la profundo de lia animo vokas lin al io alia, al io multe pli granda kaj alta, al io, kio ne estas konkordigebla kun tio.

Li memoras: li servis la s. Meson en la preĝejo, kaj kiam la paroĥestro post rekviemo benis la katafalkon, li portis la fajruĵeton, kaj kontraŭvizaĝe al li, ĉe la barilo, genuis ŝi. Preskaŭ ĉiutage ŝi venadis al la Meso kaj genuis samloke. Komence li ne estis rimarkinta ŝin, sed post kiam li unufoje estis ekvidinta ŝin, jam li ne povis forpeli ŝian bildon el sia fantazio: ŝiaj harmonia staturo, nigra hararo, bela, ronda, iomete pala vizaĝo, kaj precipe la okuloj, nigraj, profundaj, sed graciaj kaj mildaj.

Cetere dum la tago li ne vidas ŝin, ĉar ŝi estas loĝanta en alia vilaĝparto. Kaj kiam iumatene ŝi hazarde ne venis al la s. Meso, li sentis ian malplenon en sia animo. Dimanĉe dum la prediko li ĉiam venas el la sakristio antaŭ la altaron. Li diras al si mem, ke tiamaniere li pli bone povas aŭdi la predikon, sed laŭvere tion li nur faras por vidi, ĉu ŝi ne ree staras sur sia kutima loko ĉe la barilo.

Ivo havas grandan kaj noblan koron, estas entuziasmigita pri siaj profesio kaj idealoj. Lin vokas kaj altiradas la animoj, al kiuj li poste, kiel sacerdote, helpos trovi Dion. Sed aliflanke antaŭ lia animo aperis io, pri kio li ĝis nun neniam vere pensis, io tiel agrabla kaj dolĉa, tiel ĉarmonplena kaj dezirinda! Verdire tion oni ankoraŭ ne povis nomi „amo”, sed estis almenaŭ revo, konjekto de la amo.

Sed tiuj du aferoj, la sacerdota profesio kaj la amo al virino ne povas kuniĝi. Aŭ unu, aŭ alian. Ivo batalas. Jam dum kelkaj semajnoj luktas en sia animo. Tia stato kaŭzis lastatempe en li tiun maltrankvilon kaj strangecon.

Kaj nun li nerveze, rapide paŝas. Li nek vidas, nek aŭdas ion en sia ĉirkaŭaĵo. Senĉese en lia kapo turniĝas la pensoj kaj memoroj pri liaj junuloj, pri la seminario kaj ĉiuj tiuj belaj revoj pri lia Unua Sankta Meso kaj estonta sacerdota agado. Sed tra ĉio tio pusiĝas kaj enpenetriĝas tute alia bildo: ŝia staturo, ŝiaj okuloj.

La batalo estas longa, ankoraŭ ĝi ne povas finiĝi. Kaj senforta, li fine ekgenuas

sur la roshumida herbo kaj per la manoj kovras la vizaĝon malsekan de larmoj : „Dio mia, ĉu mi vere devas ĉion forlasi kaj oferi? Sed ĉi tio estas tiel ĉarma, tiel alloga ”

Lia koro forte batas. Li estas tre afliktita, ankoraŭ ĉiam li batalas kaj ŝancelas. Finfine li kunigas ĉiujn siajn fortojn, premas la manojn sur la brusto kaj preskaŭ laŭte ekparolas: „Malgraŭ tio, mia Dio, pro via amo mi rezignas pri ĉio mi donacas ĉion al vi mi volas esti fidela al vi ĝis la tombo mi volas . . . servi nur al la animoj kaj al vi!”

Profunda spiro eliras el lia brusto. Li levas la kapon kaj kun laca sed malŝarĝita animo rigardas la lumajn, brilantajn stelojn. Kaj lian koron plenigas ĝojo, la nova ĝojo, la ĝojo pro la granda ofero.

Trad. el kroata lingvo A. Ŝvaljek.

★

Filatelio.

La unuaj poŝtmarkoj sur kiuj ni vidas la Dipatrinon estas sendube tiuj de Bavarujo (1-1¹/₄-1¹/₂-2¹/₂ M), desegnitaj de la artisto Sigmund von Wisch. Ili aperis en 1920, memore de la venko antaŭ 300 jaroj de la Princelektisto de Bavarujo apud la „Blanka Monteto” (1620). Flanke de la Madonobildo ni legas „Patrona Bavariae” (Patronino de Bavarujo).

La saman jaron, je la 5a de Oktobro, la Princlando Liechtenstein eldonis serion de 3 poŝtmarkoj (50H-8. H-2K), memore de la 18a naskiĝtago de Princo Johano II-a. Tiujn markojn desegnis Tana kaj Luigi Kasimir.

Ceteraj Madonomarkoj, kiujn Liechtenstein eldonis, estas:

1941: 10 Fr — Madono de Dux;

1949: 50 Rp — Maria kun Jesuinfano, laŭ pentraĵo de Hans Memling;

1952: 30 Rp — Maria kun Jesuinfano, laŭ pentraĵo de Botticelli.

Kelkaj filatelistoj opinias ke la unuaj poŝtmarkoj kun bildo de la Dipatrino estas tiuj de Virgin Insuloj (Virgin Islands). Ties unuaj p/markoj (1P-6P), kaj ankaŭ tiuj eldonitaj poste, vidigas virgulinon kun lampo kaj lilio, kiu prezentas Stan. Ursulan. Kolombo eltrovis la insulojn la 21an de oktobro 1493, la festotagon de St Ursula kaj kunulinoj, virgulinoj kaj martirinoj; kaj pro tio la insuloj estis nomataj „Las Virgines”.

Tiujn markojn ni do aranĝas en nia subkolekto ”Sanktuloj”, kaj ne en „Dipatrinaj”.

Novajoj:

Dominicana: unu marko — 1 ct — Kristo kun la infanoj. La saman bildon ni vidas sur marko, eldonita en 1951.

Francujo: unu marko — 12 Fr — sepikolora kaj brunsiringviola: Katedralo de Limoges.

En la heraldika serio aperis nova valoro de 5 Fr.: blazono de Sain-tonge kun episkopa mitro (blua/flava).

Vatikano: Serio de 3 markoj, honore al Sankta Bonifacio, apostolo de Germanujo (10L, griza — 35L, violkolora — 60L, smerald-verda). Bildo de St. Bonifacio kaj la Katedralo de Fulda.

Filipinoj: unu marko — 10 ct, helblua — portreto de patro José Burgos, edukisto, patrioto, pioniro por enlanda ekleziularo kaj martiro. Kun la patroj Gomez kaj Zamora li estis mortigata la 17an de februaro 1792 dum la ribelado en Cavite apud Manilla.


J. S. Jansen.

MARIA ZELL kun sia „MAGNA MATER AŬSTRIE”.

Se oni en pli fruaj tempoj nomis MARIA ZELL la aŭstria regna sanktejo, tiam ĝi ankaŭ nun estas pli ol kvazaŭ nur aŭstria nacia Mario-sanktejo. Ĝia signifo estas multe pli vasta.

Fakte dum jarcentoj ne nur la popolo de la nuna Aŭstrio pilgrimis al sia „Granda Patrino”, sed same la Hungaroj al sia „Granda Estrino” kaj la Ĉeĥoj, Kroatoj kaj Slovenoj al la „Patrino de la slavaj popoloj”.

Tiel ankaŭ vere simbole konstruigis tie la unuan grac-preĝejon Henriko de Moravio (la frato de Otokaro de Bohemujo) en la jaro 1200. La duan preĝejon fondis Ludoviko la Granda de Hungarujo kaj Polujo 1370, kaj kun la konstruado de la preĝejo, kia ĝi, pligrandigita kaj plibeligita, ankoraŭ nun staras, estas persone ligita la imperiestro Ferdinando IIIa.



Ĉiam, kiam la tradicia kredo estis en danĝero, Maria Zell fariĝis centro de la religia evoluo. Jam dum la tempo de la Hus-anoj („husitoj”), poste dum la reformacio, plue en la 19a jarcento sub la sankta Klemento Mario Hofbauer, tiam kontraŭ la liberalismo; poste jam en nia jarcento fama jesuita pastro Abel gvidis ĉiujare milojn da viroj al la pilgrimejo. Tiuj pilgrimoj de viroj okazas ankoraŭ nune sub la speciala gvido de kardinalo d-ro Th. Innitzer, ĉefepiskopo de Vieno. La granda katolika kongreso 1952 estis preparita en Maria Zell kaj la 1an de Majo en la Mariana jaro 1954, 7000 junaj laboristoj tie kunestis, preĝante, meditante, interkonsiliĝante, kaj kun ili preskaŭ ĉiuj aŭstria episkopoj.

Maria Zell estas ankaŭ nomata la „Konfesejo” de Vieno, ĉar multaj miloj da pilgrimantoj el Vieno precipe en Maria Zell sin sentas vokataj al la sankto konfeso. Pli ol 1000 geedziĝoj okazas ĉiujare antaŭ la graco-altaro.

Ĝis nun Maria Zell estis filio de la stiria Benediktana Abatejo St. Lambreĥt, kie bedaŭrinde iom mankas nova anaro, dum Maria Zell pli allogas al eniro en la ordenan vivon.

Tial la sankta Patro Pio XIIa la 1an de Decembro 1954 per aparta „Breve” deklaris „MARIA ZELL” memstara monaĥejo kun propra noviciato, kun la rajtoj kaj privilegioj de ĉiuj abatejoj de la Benediktana Kongregacio en Aŭstrio. La papa brevo validiĝis la 8an de Decembro 1954.

La religie grava, historie signifa fama baziliko en la belega montar-regiono de Stirio (liglando aŭstria) estas bedaŭrinde diversflanke difektita kaj bezonus fundan renoviĝon. Tial pastro Beda O.S.B., ĝia senlaca pioniro, famkonata ankaŭ kiel efikplena radio-predikanto, insiste petas helpon kaj subtenon por la endanĝerigita malnova inda pilgrim-preĝejo. La aŭstria federacia kanceliero (Inĝ. J. Raab) mem direktis koncernan alvokon al la aŭstria popolo, resp. al ĉiuj amikoj de la gracloko Maria Zell: Ĉiu donaco aŭ donaceto dankeme akceptata, kontribuu, por ke la unika Maria-sanktejo brilu en nova digno kaj beleco je sia 800a jubileo en la jaro 1957.

W. Mudrak, Wien.



Ni funebras

Post longa malsano nia membro, la rev. kanoniko **Julio Lajoŝ**, fondinto kaj prezidanto de la Esperanto-grupo en Pécs, Hungarujo, redonis la 30.III.1955 sian noblan animon al sia Kreinto, en sia 78a jaraĝo. Post sia sacerdotiĝo en 1899 li laboris dum kelkaj jaroj en diversaj lokoj; en 1905 li fariĝis inspektoro, en 1917 direktoro de la mondfama pécsa katedrala kantĥoro, al kiu posteno li dum 20 jaroj dediĉis sin kun amplena fervoro, tiel ke liaj lernantoj vere amis lin kiel patron.

Kiel rekompenco por la grandaj meritoj li ricevis en 1920 la honoran titolon de papa ĉambelano, en 1921 de sanktaseĝa juĝisto, en 1934 li fariĝis kanoniko. En 1937 li estis nomata estro de la katedrala paroĥo, kaj en 1941 tit.preposto.

Julio Lajoŝ estis fervora esperantisto, la unua en Pécs, kie li senlace semis kaj semadis, instruante nian lingvon en multaj kursoj, direktante la E-grupon, predikante en Esperanto, vizitante multegajn naciajn kaj internaciajn kongresojn, kie lia afabla, bonhumora kaj simpatia karaktero gajnis multajn amikojn inter la E-istaro, de ĉiaj profesioj kaj religioj. Li estis la vicprezidanto de la glora unua Eŭkaristia Esperanto Mond-Kongreso, kiu okazis 1938 en Budapeŝto. Ĝis lia morto li restis fervora E-isto kiu volonte preĝis en Esperanto.

Post la solenaj entombigaj ceremonioj, fare de la helpepiskopo de Pécs kun asistado de aliaj sacerdotoj, adiaŭis lin ĉe la tombo du samideanoj; en la nomo de I.K.U.E. f-ino Heleno Fiedler diris kortuŝajn vortojn.

Ni rekomendas la animon de la mortinto en la preĝoj de ĉiuj IKUE-anoj kaj speciale en la s. mesoj de la sacerdotoj. Li ripozu en paco!

NOMOJ DE SANKTULINOJ EN ESPERANTO II

Por la ĝenerala derivado de inaj propraj nomoj per la finaĵo -ino laŭ Johann Schröder oni povas doni du argumentojn :

1°. La derivado de la propraj nomoj akceptas la leĝon de la komunaj nomoj por derivi inajn nomojn.

2°. Oni akiras — laŭ la vortoj de Schröder mem — „tujan klarecon pri la tiasenca kvalito de nomo”, do oni tuj povas konstati, ke la nomo indikas inan personon. La sama aŭtoro tamen ne povas prisilenti kontraŭargumenton: (la nomo) „nur iafoje iom estas plilongigata”.

Fakte tiu ĉi rimarko nur valoras kompare kun la samaj nomoj en naciaj lingvoj, se tiuj finiĝas je in aŭ ine, ekz. : france : Josephine esperante : Jozefino
Sed se la finaĵo en naciaj lingvoj estas alia, la esperanta nomo foje montriĝas multe pli longa, ekz. : france : Jeanne esperante : Johanino

En Esperanto krome inaj formoj fariĝas ĉiuj pli longaj ol la koncernaj viraj nomoj. Alian kontraŭargumenton indikas K. Kalocsay en : Lingvo Stilo Formo (Budapeŝto, 2a eid. p. 81-83): „Vortoj kiel Antoniino, Konstantenino k.t.p. estas terure longaj kaj plumpaj, vere ne taŭgaj por esti la nomo de ĉarma knabino.”

Li eĉ opinias ĉi tiun malhelpon tiel grava, ke li aldonas : „Vere, la sufikso ino apenaŭ taŭgas tie ĉi. „Pro tio li proponas tute forĵeti tiun sufikson por la propraj nomoj!

Prave li krome rimarkas, ke oni evitu nomojn, kiuj ne klare indikas la inan karakteron. Tial li pluiras: „Mariino estas tute ne ebla, nereconebla, dum Mario ĉe la italoj estas ofte uzata vira nomo. Same: Berto, Dianio, Emilio, Ireneo k.t.p.” Pro la sama kialo la regulo de A. Dombrovski proponita ŝajnas tro simpla (E.K. 2, 1905, 31, 32): „Por trovi necesajn radikojn de nomoj propraj, oni devas forĵeti la finiĝojn latinajn de l' nominativo : -a, -as, -e, -is, -um en nomoj inaj. Tiamaniere ni povas skribi esperante: Evo, Saro, Mario, Felicito (Felicitas), Zoo (Zoé), Gertrudo, Hedvigo, Eŭstoĥio (Eustochium), ktp. ; plue li proponas: Anno, Mario Magdaleno, Agato, Lucio, Agneso, Cecilio, Katarino, Anastasio.”

Poste li revenis sur pp. 52-53 por pliprecizigi sian opinion: „Tiaj nomoj kiel Julio, Julia, Kajus, Kaja, Justinus, Justina, laŭ mia opinio devas en Esperanto sonadi kiel: Julio, Kajo, Justino, k.c. , sendiference, ĉu ili estos viraj aŭ virinaj.”

Nu, tia simpleco nek estas konvinka, nek alloga, kaj la historio de Esperanto sufiĉe montris, ke oni ne akceptis la opinion de Dombrovski. La uzado de nomoj kiel Mario, Agneso, Terezo, tamen montras lian influon.

Por eviti konfuzon inter viraj kaj virinaj nomoj Mezzini proponis tute novan finaĵon -io. Tiel la traduko de Antonia, Emalia, Octavia, Victoria, Julia, estos: Antonio, Emilio, Oktavio, Viktorio, Julio.

Prave K. Kalocsay ankaŭ forĵetas tiun proponon: (tiuj nomoj) „estis uzataj ĝis nun kiel viraj nomoj, malfacile estus de nun uzi ilin kiel virinajn. Krome, ĉi tiu solvo devigus nin uzi la terurajn, nenaturajn vortojn: Aleksandrio (urbo!), Bertio, Renatio, Franciskio, Paŭlio, Vestio, fremdajn al ĉiu lingvo de la mondo. Certe: prefere Vilhelmino, Franciskino, Jozefino, ol la supraj senformaj formoj.”

La konkludo de la sama aŭtoro (p. 83): „La virinaj nomoj apartenas al tiu ĝena flanko de la lingvo, kiu ne estas kontentige solvebla per la propraj reguloj kaj sufiksoj de la lingvo”, ŝajnas senesperiga. Sed li proponas propran solvon, kiu „tamen ne kontraŭas la proprajn regulojn de la lingvo.”

(Daŭrigota) H. G. Wannemakers. S.J.

★

LA KOMENTARIO DE LA NOVA „FUNDAMENTA KRESTOMATIO” — II.

3. Multaj piednotoj ŝanĝas evidentajn arkaismojn: **miljaro (jarmilo)**, **eltiri la manojn (etendi la manojn)**, **vesti surtuton (surmeti surturon)**, k.t.p.

4. Koncerne la prepozicion **da** Downes estas pli zamenhofa ol Zamenhof mem. Laŭ LINGVAJ RESPONDOJ „estas diferenco inter **multaj homoj kaj multe da homoj**: multaj homoj diversaj homoj (ĉiu aparte); multe da homoj granda nombro da homoj (kune)”. Kvankam Zamenhof skribis tion en 1893, lia Krestomatio de 1903 ne tre atentis tiun regulon, kaj prave, ĉar se ni devus ĉiumomente elekti inter **multaj kaj multe da**, Esperanto estus pedanta lingvaĵo! Tamen Downes enterprenis la taskon „korekti” la tekston. Rezultis ofte du sinsekvaj prepozicioj **da**: **kelkajn dekojn da paŝoj** (p. 132) fariĝis: **kelke da dekoj da paŝoj**. Alia da-aĵo: **Amaso da tiuj densaj ĉambretoj** diras Zamenhof (p. 212), kaj Downes notas: „Legu **de**, ĉar **tiuj** estas definitiva vorto, antaŭ kiu **da** (kiu = de ia) estas tute netaŭga”. Ni ne komprenas tion, kaj la mistero fariĝas eĉ pli granda, ĉar sur p. 273 mi legas: **apartan novan serion da tiuj ĉi finiĝoj**: ĉi tie Downes ne proponas **de**.

5. Multaj piednotoj ŝajnes al mi rekte kontraŭaj al la zamenhofa lingvouzo. Zamenhof neniam volis ligi la lingvon al tro striktaj reguloj kaj li ne hezitis uzi esprimojn kiuj eble ne estis tute „logikaj”. Certe li ne volis ke la Krestomatio fariĝu modelo de pedante preciza stilo. Kaj ĉu ne temas pri tio en jenaj ekzemploj? **La Fundamenta Krestomatio por ĉiam gardos lin de . . .**; noto: forigu **por**, ĉar la intencita signifo ne estas **eterne** (p. XI).

ĉiuj unu post la alia; noto: unu post la alia komprenigas ke troviĝas nur **du** personoj aŭ objektoj. Ĉi tie troviĝas multe da personoj, do forigu „la” kaj legu **unu post alia** (p. 20).

1¹/₂ jarojn; noto: unu jaron kaj duonon (p. 187).

li eĉ ne estas sinjoro; noto: li estas eĉ ne sinjoro (p. 128).

konstruo; noto: konstruaĵo (p. 41 kaj ofte; kaj la principo de **neceso kaj sufiĉo?** **mi . . . lasos min elirigi nur per vi**; noto: legu **lasos min esti elirigita nur de vi** (p. 32)

unu aŭ kelkajn tagojn; noto: unu tagon aŭ kelke da tagoj (p. 293).

ŝi kantis la plej bele; laŭ noto en Aldono (p. 441) tiu esprimo estas ĝusta kaj imitinda

Mi jam diris ke estas delikata tasko komenti tekston de Zamenhof, Kion unu laŭdos, la alia (pardonu: ne **la alia**, sed **alia?**) riproĉos. Sed egale ĉu oni konsentas kun ĉiuj piednotoj de Downes aŭ ne, la Krestomatio en sia nuna formo certe instigos al pripensado kaj diskutado, kaj jam pro tio Downes faris laboron tre utilan.

D-ro W. Manders.

*

Milano. Esperanta eldono 1955-1956. Senpage havebla ĉe Ente Provinciale per il Turismo, Via Caserotte 3, Milano (Italujo). Granda faldfolio kun du urbaj planoj, ampleksa, klara kaj detala priskribo de ĉiuj vidindaĵoj kaj sciindaĵoj, kiu certe estas trafa propagando por allogi multajn diverslandajn E-istojn al tiu mirinde bela urbo. x

Münchenwiler en Svislando. Kvarpaĝa ilustr. broŝuro pri la Internacia Kurso pri Esperanto kaj Geonismo de 7-14.VIII. 1955. Organizo: Svisa Esperanto-Societo kaj Svisa Esperanto-Instituto, Hotel Metropole, Bern. x

LA UNUA LOKOMOTIVO.

La lokomotivon: mi vidis ĝin!
Denove tremeto trairas min!
Jes, tian monstraĉon - ve! - kian mi tiam
Estas vidinta, mi vidis neniam.
Ĉar kvankam altpreze mi vidas prefere
Bestaĉon au marvirineton, jes vere!

Ni staris ĉi-foje ĉe l'fervojgardisto.
(Mi mem kaj Johano, la terlaboristo!).
„Atentu!” (ekkriis la viro gardanta)
„Eĉ ne jam vidate ĝi estas venanta!”
Ĉi tion aŭdinte mi flanken rigardas:
Jen! Ĝi proksimiĝas kaj ege ĝi ardas.

Ju pli tiu monstro ja alproksimiĝis
Des pli al mi ŝajnis, ke ĝi pligrandiĝis!
Ĝi fumon eligis el sia tubego
Kaj estis fajfanta kun multa bruego.
Mi ĉirkaŭrigardis: neniun vidinte
Mi vokis: „Plu iru”. Kaj tion dirinte

Mi aŭdis, ke krio subite eliĝis:
Krifajfo, pro kiu mi preskau surdiĝis.
Ho tia bruego timigus la ĉielojn.
Enĉerbe mi vidis eretojn kaj stelojn.
Mi kaptis barilon, ĉar ŝajnis al mi,
Ke nevideblaĵo min puŝis, ho fi!

Kaj antaŭ ol ree mi povis enspiri
Kaj vidi l'maŝinon: mi vidis ĝin iri l
Demandis mi: „Kiel vi fartas, karulo?”
„Mi sentas” - responde - ”min frenezegulo!”
„Mi ankaŭ” mi diris. „Ho, tia bruego
Ne povas ne veni el la inferego!”

„Mi vidis”, li flustris, „satanon staranta
Jes, kiel nigrulo ĉe fajro brulanta!”
„Satan' au nigrul': estas ne disputinde:
Ĝar ĉiam mi mi diros: ja estas mirinde
Ke oni sen brido, ĉeval' kaj vipego
Povas veturi per tia ĉarego!”

Laŭ B. van Meurs

El ned. lingvo trad. H. F. v. Denzen

*

„BIENALO” DE LA RELGIA FILMO

Jen prezentiĝis la IVa **Internacia Semajno de la Religia Filmo** en Vieno de 23a - 30a de Aprilo, sub protekto de la kardinalo-ĉefepiskopo d-ro Innitzer, prelato d-ro Laszlo (apostola administranto), oficiala episkopa komisiito por la film-fako, plue de la evangelia (protestanta) episkopo d-ro May kaj instru-ministro d-ro Drimmel, aranĝita de **Katolika Filmgildo**, sub gvido de prelato d-ro Rudolf; kunlaboris la evangelia filmgildo. Komenciĝo per inda malfermo en Koncert-domo Viena kaj solena Di-servo en la katedralo de Sta. Stefano, sankta meso kun signifa prediko de la fama patro Diego Götz O.P.; ĉeestis, invititaj, eminentaj film-aktoroj; paralele okazis protestanta Di-servo.

El la nombro de la, parte altkvalitaj, valoraj lud- kaj kulturfilmoj estu citataj i.a. la itala filmo pri nia sankta Papo Pio Xa, „De kampara paroĥestro al papo”, emociige montranta precipe ties sinofereman luktadon kontraŭ la milito kaj por la paco. Profunde tuŝis la franca, forte kaptanta socia filmo „Abbé Pierre, la apostolo de Parizo”, pensigis alia franca filmo, kvankam malfacilproblema, „Vivanta Pano” pri la sankta meso, kaj, kundepende, gejunula amo, kun teksto de François Mauriac; plue „Tero Sankta”, belga filmo pri Palestino kaj ĝia loĝantaro; „Duelo de Koroj”, hispana-germana komuna produktaĵo, germanlingva; ankaŭ nefaciltema, hispana filmo „Kristo”, prezentata laŭ famaj pentraĵoj el la **Prado** en Madrid; bonhumora, tamen sencplena angla filmo „La strangaj vojoj de pastro Brown”; ankaŭ protestanta misi-filmo el la franca „Kongo”, sveda produktaĵo germanlingve prezentita „Sub la Kruco de l'Sudo”, parte kultura filmo, ktp.

Same la diversaj kultur- aŭ dokumentar-filmoj prezentitaj estis allogaj, multflanke valoraj, i.a. pri „Gotikaj Artaĵoj” kaj „Ordino” (sacerdotigo) ambaŭ francaj, krome

produktaĵo de la aŭstria katolika filmgildo „La trezoro de la okcidento” pri la „sekulara kaj eklezia trezorejoj” en Vieno, k.a.

La religia filmsemajno estis ĉiuokaze ree plena sukceso, kvankam certe ne ĉiuj parteprenantoj povis plene percepti kaj ĝui la parte fremdlingvajn unikajn filmprezentadojn.

Walter Mudrak, Vieno.

*

Por amuzo.

Maljunulino donas konsilon por prijuĝi novan ĝardeniston: Rigardu lian pantalonon; se ĝi estas flikita sur la genuoj, dungu lin; se ĝi estas nur flikita sur la fondo, ne dungu lin! x

La nova stratpurigisto ricevas instrukciojn de la ĉefo. „Do vi iru al la Longstrato kaj ekpurigu la defluilon; vi simple balaos ĉiam rekte antaŭen.” Je la 17a horo ĉiuj stratpurigistoj revenas por iri hejmen, escepte de la novulo. La postan matenon alvenas telegramo el apuda urbeto: „Sendu novan balailon, alia tute eluzita - Fervorulo.” x

Ebriulo vane penadis enirigi la ŝlosilon en la ŝloson, intertempe gaje kantante. Post kelka tempo kapo aperas el la supra fenestro.

„Foriru do, idiotulo!” krias la viro el la fenestro, „vi klopodas eniri la malĝustan domon.”

„Idiotulo vi mem!” indignite rekrias la ebriulo. „Vi estas rigardanta el la malĝusta fenestro!” x

El anonco: Ne mortigu vian edzinon. Lasu tiun malpuran laboron al niaj lavmaŝinoj! x

E N I G M O.

La solvo estas sentenco de 33 literoj. Jen la ŝlosilvortoj:

8 - 15 - 5 - 16 - 7	= fari ŝtofon el fadenoj
10 - 15 - 12 - 20 - 9	= esperanta koloro
29 - 30 - 14 - 24 - 33	= bonodora floreto
32 - 27 - 28 - 3 - 4	= tunelfosema besteto
22 - 23 - 15 - 11	= plenumi ies ordonon
1 - 18 - 24 - 13 - 2	= ĉesi iri
17 - 21 - 26 - 21 - 28 - 13 - 14	= senorda bruoj
19 - 25 - 31 - 11	= sudafrika virinnomo
6 - 30 - 20 - 7	= gaja afero

(Solvo en la sekvonta numero de E.K.)

C. M. van Staten, Utrecht.

*

LA MUŜO SUR LA BOVINVOŜTO.

La irlanda verkisto George Moore, atinginte proksimume la supraĵon de la Parnaso, en sia vantaĵo faris stultaĵojn, kiuj ridindigis lin antaŭ la okuloj de ĉiuj seriozaj homoj. Foje en Dublino li skribis al la ĉefepiskopo, D-ro Walsh: „Mia kara ĉefepiskopo, ĉu vi aŭdis la novaĵon? Mi forlasis la Eklezion. — GEORGE MOORE,”

Senprokraste venis la respondo:

„Mia kara George Moore: ĉu vi aŭdis la rakonton pri la muŝo sur la finaĵo de la bovinvoŝto? La muŝo diris: „Bovino, mi tuj forlasos vin.” La bovino rigardis super sian ŝultron dirante: „Ĉu efektive? Nu, mi eĉ ne sciis ke vi estas tie!” — WILLIAM, ĉefepiskopo de Dublino.”

Esperanta vivas.

Nerifutebla pruvo por la vivkapableco de Esperanto estas la faktoj, ke ĉiujare okazas tre multaj internaciaj kongresoj. Ni volas mencii la plej gravajn, kiuj okazos en ĉi tiu somero, sed devas atentigi niajn legantojn, ke la listo ne estas kompleta kaj ke ni ankaŭ nur povas mencii la vere internaciajn kongresojn, kvankam ni bone scias ke okazas multnombraj tre gravaj naciaj, kiujn vizitas multaj eksterlandanoj kaj kie la partoprenantoj nur parolas Esperanton.

16-23 Julio: Internacia Ferio-Semajno en **Jugoslavio**. Informoj: Vojvodina Esperantista Ligo, Zmaj Jovina 4/II, **Novi Sad** (Jugoslavio).

17-24 Julio: Tria Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno en **Rio de Janeiro, Brazilo**. Informoj: Espero Katolika, Vleuten, Ned.

23-30 Julio: Kongreso de la Kristana Esperantista Ligo Internacia en **Reims, Francujo**. Informoj: s-ro J. Argenta, 43 rue St. Georges, Paris-9.

23-29 Julio: Internacia Ferio-Semajno en **Konstanz, Germanujo**. Informoj: I.F.S. Esperanto, Grüngang 8, Konstanz.

30 Jul. - 6 Aŭg: U.E.A. Kongreso Jubilea en **Bologna, Italujo**. Informoj ĉe U.E.A. Heronsgate, Rickmansworth -Herts. Anglujo kaj ĉe la landaj delegitoj.

7-14 Aŭg: Internacia Junular-Kunveno de T.E.J.O. en **L'Aquila, Italujo**. Informoj: Loka Organiza Komitato, Via S. Martino 8, L'Aquila.

*

Recenzoj.

André Ribot: L'ESPERANTO AU SERVICE DU CHRIST. 24-paĝa franclingva broŝuro, eld. la aŭtoro, 11 Rue Paul Vergnes, Marmande (L. & G.) Francujo. — Ni gratulas niajn francajn samkredanojn pro ĉi tiu bonega helpilo por la propagando de Esperanto. En 8 ĉapitroj ĝi klare montras kiel la universala lingvo povas utili al nia universala Eklezio. Ĝi pritraktas la klopodojn por solvi la lingvan problemon ek de Descartes ĝis inkluzive D-ro Zamenhof; citas multajn parolojn de papoj kaj episkopoj favore al Esperanto; montras kiel E. povas instigi al unueco kaj amikeco sur internacia tereno kaj servi al pli bonaj rilatoj inter la diversaj eklezioj. En apartaj ĉapitroj estas priskribita la praktika utilo por internaciaj movadoj kiel Pax Christi, la laboro de la Intern. Katolika Informejo, Espero Katolika, literaturo kaj liturgio kaj la decidoj de Unesko en Montevideo. La kovrilo surhavas koncizan superrigardon de la gramatiko, adresojn de skriba kurso, IKUE, IKI, de la Franca Katolika Esperanto Ligo kaj ĝia Libro-Servo.

Ni esperas ke la libreto, kiu estas havebla en la ordinaraj francaj libretoj, vekos grandan intereson por Esperanto ĉe la francaj katolikoj. x

VALENCIO, IDEALA URBO DUM LA TUTA JARO. — Eld. Soc. Valenciana Fomento del Turismo, Valencia (Hispanujo). 8-paĝa ilustr. faldfolio kun priskribo de la historio, kulturo, folkloro kaj vidindaĵoj de la belega hispana urbo, kiu certe faros neforgeseblan impreson sur libertempantaj vizitantoj. x

Sankta Vincento Ferrer. La Asocio de „San Vicente Ferrer del Mocadoret” en Valencia, Hispanujo, eldonis, okaze de la 500a datreveno de la enkanonigo de l'valencia sanktulo, bone prizorgitan, bele presitan kaj ilustritan 32 paĝan broŝuron, enhavante la programon de la festoj en Aprilo ĉ.j., intervjuojn kun eminentuloj, kantojn honore de la sanktulo kaj ties biografion, en kataluna kaj hispana lingvoj, kun traduko de la biografio en bonega Esperanto. Ni kore gratulas kaj ankaŭ dankas la Hispanan Esperanto-Federacion pro sia kunlaboro. x

T.D.